AKTUALAJ INFORMOJ DE JURBARKAS'AJ GEESPERANTISTOJ

# HORIZONTO

Jurbarko esperantininkų informacinis leidinys

NUMERO 1(24) (I-A KVARONO) 2018

## SALUTOJ, BONDEZIROJ

Intertempe 04.01-06.30 klubanoj festis naskiĝtagojn: estimata sinjorino Laimutė Ašmonaitienė (04.05)




Ni ĉiujn gratulas kaj deziras al vi sanon, sukceson kaj ĝojon!

**Geklubanoj de Esperanto klubo**

Karaj,

Gajan, belan kaj agrablan Paskofeston deziras al vi.

**Prezidanto de la Esperanto klubo Horizonto**
**Stanislovas Raulynaitis**




## INFORMOJ

**La 26-an** de aprilo okazis vica kluba kunveno, de la Jurbarkas Esperanto klubo Horizonto. Partoprenis 5 anoj de la Esperanto klubo. Por la kunveno lokon ni elektis apud rivereto Imsrė, ĉar ĉiuj deziris kunvenon en naturo.

Prezidanto Stanislovas Raulynaitis informis pri la novaĵoj el Esperanto movado. Ankaŭ informis li pri la deziro partopreni en la konkurso por la ricevi subtenon al la klubo per mono. Ankaŭ oni povis registriĝi por la ekskurso al Pakruojis. Klubanino Zofija Babonienė rakontis impresojn el la ekskurso al Jerusalemo. Ekskurson al la Izraelo al ŝi donacis nepino.

**Irena Viliušienė**



**Sur la foto de dekstre Zofija Babonienė, Janina Martišienė, Regina Petraitytė kaj Irena Viliušienė**






**Printempaj floroj apud loko por kunveno de klubanoj**
**Fotis Stanislovas Raulynaitis**




## Vojaĝaj impresoj

Inter la 30a de januaro – 6a de februaro 2018 j. mi vizitis urbon Jerusalemo en Izraelio. Plej multe mi interesiĝis pri antikva Jerusalemo. Tio estas ŝajne la plej interesa urbo, kiun mi iam vizitis dum mia vivo. Estas rakontate, ke, ĉiu vizitinta ĉi-tiun antikvan urbon, spertas multe da fortaj emocioj.

Jerusalemo estas antikva urbo de Izraelio, situanta sur montetoj de Judeo, preskaŭ 800 m super la nivelo de maro, fondita eĉ pli multe ol 3000 j. antaŭ Kristo. Teritorio de ĉi-tiu urbo okupas 125 kv.km. Urbon ĉirkaŭas tre alta muro, kiu daŭras 4,5 km ringe. Izraelitoj kaj kristanoj agnoskas Jerusalemon kiel ĉefurbo de Izraelio. Tio estas tre montriĉa regiono. Preskaŭ ĉiuj montoj kaj montetoj dense loĝataj kaj mem urbo fieras per blankaj konstruaĵoj. En Jerusalemo loĝas ĉirkaŭ 830000 da loĝantoj, 6600 homoj sur 1kv.km.




Sur mapo la bruna parto estas malnova urboparto de Jerusalemo. Tio estas nuna malnova urbo, tamen ĝi pli antaŭe, antaŭ du mil jaroj aspektis iom alimaniere, ĉar urbo estis detruita kelkfoje, ŝanĝiĝis regantoj kaj ĉiuj ŝanĝis limon de urbo.




Bruna zigzago – tio estas Dolora vojo de Kristo kun 14 stacioj, kie Kristo finfine estis krucumita. Supre - la monto de Olivo (dekstre de monto - malnova tombejo). En ĉi tiu tombejo estas entombigita Maria,la patrino de Jesuo kaj multe da aliaj apostoloj kaj eminentaj homoj.

Informilon preparas redakcia komisiono.




Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj



Inter malnova urbo kaj monto de Olivo verdas valo de Kedrono, de kiu maldekstre fieras ĝardeno de Getsemane.




Ĉirkaŭ 1800 j. antaŭ Kristo,la reĝo Davido Jerusalemon proklamis kiel ĉefurbon. Kaj lia filo reĝo Salamono konstruis sanktejon, kaj de tiu tempo Jerusalemo – sankta urbo por judoj kaj kristanoj.



Pejzaĝo de Jerusale.

En malnova urbo estas multe da tiaj stratetoj.Sur la monto de Siono situas palaco de Davido. Supozeble, ke ĉi tie estas lia tombo ankaŭ. Ĉi tie staras monumento al Davido. Jen unu korto de palaco.



Informilon preparas redakcia komisiono.





Plorada muro, estas dividita en du partoj: al viroj kaj al virinoj. Eĉ enireja pordego estas dividita por viroj kaj aparte por virinoj.

Viroj kutime trapasas la tempon ĉe la muro tre gaje, ili dancas kaj kantas aŭ preĝas, festas diversajn festojn. Kontraŭe virinoj preĝas malforte, alproksimiĝintaj apud la muro kaj restigas siajn leteretojn kun diversaj deziroj al Dio.

Malnova urbo de Jerusalemo estas dividita en kvar partoj: musulmanoj, judoj, kristanoj kaj armenoj. Ĉi tie ekzistas tri fundamentaj religioj: judaismo, kristanismo kaj islamo.

En Jerusalemo estas multe da historiaj interesaj vizitindaj lokoj. Unu el la plej abunde vizitataj lokoj – la Plorada Muro.





Informilon preparas redakcia komisiono.



Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj




Citadelo de Jerusalemo,la turo de Davido     Tombo de Davido




**Dolora vojo de Kristo (komenco)**



**Stacioj de la Dolora vojo de Kristo**

Jesuo Kristo iris sur tiu Dolora vojo portante krucon kaj en 9 lokoj okazis *iuj okazintaĵoj. Pro tio tiuj 9 stacioj estas realaj kaj motivitaj iuj okazoj. Tamen aliajn 5 staciojn, kiujn mencias kristanoj, pripensis Jesuo Kristo mem kaj nun estas dek kvar stacioj.*







**Ĉi tie estis entombigita Kristo**



**Preĝejo sur loko, kie estis krucumita Jesuo Kristo kaj entombigita**











Informilon preparas redakcia komisiono.



Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj






**Preskaŭ en ĉiu malnova urbo okazas plej diversa komerco.**

**Ankoraŭ kelkaj vidaĵoj el Jerusalemo**








**Sur la foto de maldekstre Zofija kun parencoj**

Informilon preparas redakcia komisiono.



Dum nia ekskurso la vetero estis preskaŭ somera, temperaturo atingis eĉ 20-22 gradojn tage, tamen vespere tuj malvarmiĝas kaj blovas malvarma vento. *Ĉiuj tagoj estis sunaj, sekaj, ĉielo blua blua. Abundis diversaj turistoj, piligrimoj, tamen plej multis ĉe la Plorada Muro. En malnova urbo estas tre multe da diversaj preĝejoj. Ĉie svarmas amasoj da homoj.* .

*Z.Babonienė*

## Printempa ekskurso al Kaunas kaj Raudondvaris

La unuan de majo, ĉar estis festa tago, mi kun edzino Laimute dediĉis tutan tagon por ekskurso. Ni venis al Kaunas kaj komencis ekskurson per konatiĝo kun kastelo de Kaunas. Tie ni estis jam antaŭ longa tempo. Nun kastelo estas preta akcepti turistojn. Poste ni iris perpiede al avenuo de Libereco. Trairante straton L. Zamenhof min fotis mia edzino. Avenujo de Libereco al mi plaĉis ankoraŭ kiam mi estis juna. Pro tio mi sentas nostalgion al ĝi. Nun de la flanko de katedralo ĝis strato Mickevičius ĝi estas rekonstruita. Ankaŭ mi estis fotita antaŭ katedralo. Poste ni tagmanĝis en kafejo kaj ekveturis hejmen kun intenco ankoraŭ halti en Raudondvaris kaj iomete promenadi. Tion ni kaj faris. Unue ni vizitis preĝejon. Poste ni iris al palaco de Raudondvaris. Tie al ni plaĉis.

Hejmen ni revenis kun bona humoro.


Fotis Laimute Raulynaitiene.



**Mi en Kaunas apud kastelo**





**Kaunas. Mi en la strato L. Zamenhof**



**Kaunas. Mi antaŭ la Katedralo**



**Raudondvaris. Palaco**



**Raudondvaris. Preĝejo**



**Raudondvaris. Preĝejo de alia flanko**

## Ekskurso al palaco Pakruojis



Informilon preparas redakcia komisiono.

La 26-an de majo ni malfermis la sezonon per ekskurso al palaco Pakruojis. Nia grupo konsistis el esperantistoj kaj kelkaj parencoj, amikoj ; eltute 20 homoj. El Jurbarkas ni ekveturis je la 8-a horo. Laŭ tradicio mi gratulis per malgrandaj donacetoj ekskursantojn, kiuj festis sian naskiĝtagojn en majo. Ankaŭ organizis malgrandan kvizon pri Pakruojis.

Veninte al palaco Pakruojis ni havis eblecon partopreni en la aranĝoj de viva muzeo. Unue ni partoprenis festan renkontiĝon kun Barono sur la korto antaŭ palaco. Ni ĉiuj estis invititaj konatiĝi kun metiistoj. Diversaj metiistoj prezentis siajn manfaritaĵojn. Oni povis eĉ aĉeti memfaritaĵojn. Post konatiĝo kun metiistoj ni trarigardis palacon.



**Baronfilino invitas al la palaco**



**En la palaco**



**Baronino kun filino**



**Sur la korto**



**Sur la korto**

Informilon preparas redakcia komisiono.



Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj



**Mi kun ĉevaleto**

Poste ni iris al la kelo de puno. Tie estis mallume kaj terure. Tagmanĝis ni en la Blanka salono de bankedoj. Ni havis eblecon elekti kaj manĝi el menuo de manĝaĵoj, kiujn oni manĝis antaŭ multe da jaroj. Dum tagmanĝo al salono invadis Tado Blinda, kiu forrabis filinon de Barono. Poste post kelkaj horoj li estis kaptita. Post la bongusta tagmanĝo ni iris al bierfarejo . Ĵaldokas prezentis sian bieron. Drinkante bieron ni kantis kantojn, aŭskultis diversajn rakontojn de Ĵaldokas. Post la vizito ĉe Ĵaldokas ni estis invititaj rigardi rajdkurojn, kiujn organizas mem barono. Rajdkuroj estis interesaj kaj ni restis tre kontentaj.

**Malsupre fotoj el rajdkuroj**





Alia aranĝo - koncerto, kiu okazis en Blanka salono. Koncerto okazis ĉe lumo de kandeloj.



**Koncerto**



**Kaptita Tadas Blinda**

Post koncerto ni iris al la lasta arta aranĝo – prezento de geedziĝo. Ni havis rekte partopreni mem en geedziĝa festo: ni kantis , dancis kaj drinkis bieron.

Post geedziĝa festo ni kun bona humoro veturis hejmen.

Fotoj de Z. Babonienė kaj S. Raulynaitis

**Prezidanto de la Esperanto klubo Horizonto**
**Stanislovas Raulynaitis**

## Rememore pri Stasys Liutvinavičius



La 20-an de junio nin atingis malgaja sciigo - forpasis fama instruisto kaj kulturaganto 89-jara Stasys Liutvinavičius. Li naskiĝis la 12-an de majo 1929 en vilaĝo Jaučakiai (Jauĉakjai) , distrikto Kaunas. Li lernis en komenca lernejo de Jaučakiai, en gimnazio de Vilkija, poste studis en instruista instituto de Ŝiauliai en 1951 – 1954. En 1970 li lernis kaj finis korespondan kurson de internacia lingvo Esperanto ĉe Vilniusa Instruista domo, kurson gvidis A.Mekys. Ekzamenon li trapasis tre bone. En 1973 -78 li studis en Vilniusa Pedagogia instituto (nun Edukologia Universitato) litovan lingvon kaj literaturon, en 1997–98 li lernis en litova folklorista lernejo. Ekde 1954 ĝis 1999 Stasys Liutvinavičius laboris kiel instruisto de litova, germana, rusa kaj Esperanto lingvoj en mezlernejo de Veliuona, 1978 – 1999 estis estro de literatura muzeo en mezlernejo. S.Liutvinavičius estas aŭtoro de pli ol 200 artikoloj en distrikta kaj respublikaj gazetoj pri la land - esploro, instruado de litova lingvo kaj literaturo, Esperanto. Li eldonis libretojn :"Veliuona-urbanistikos paminklas, istorinis-landšaftinis draustinis"( Veliuona – la urbanistika monumento, historia-natura rezervejo) 1986 , „Veliuona, svarbiausios žinios" (Veliuona , la plej gravaj sciigoj) 1988, „Takai, takeliai"(La padoj, padetoj) poezia kolekto 2006, „Veliuonos sakmės ir pa- davimai" (La legendoj kaj mitoj de Veliuona) 2007."Mūsų širdys"(Niaj koroj) poezia kolekto 2008, „Esu..." (Mi estas ...) eseo pri la vivo, 2009, „Veliuonos Švnt. M.Marijos ėmimo į dangų bažnyčia" (Preĝejo de Snkt. Virgulino Maria en Veliuona) ,2009. Krome li estis kunaŭtoro de aliaj 11 libroj. S.Liutvinavičius estis ĉiĉerono kaj ekskursgvidanto de respublika kategorio en Veliuona kaj ĝia ĉirkaŭ- aĵo. Pri Esperanto S.Liutvinavičius eksciis lernante en komenca lernejo de Jaučakiai, sed lernis ĝin nur en 1970. La11-an de februaro 1971 en kulturdomo de Jurbarkas kolektiĝis grupo da personoj, kiuj deci-dis lerni internacian lingvon. En la unua kunveno S.Liutvinavičius konatigis kunvenintojn pri la histo- rio de Esperanto, pri ĝia aŭtoro L.L.Zamenhof kaj pri la metodoj de memstara lernado. Lerninte inter- nacian lingvon li amikis kun malnova esperantisto Stanislovas Galbuogis el Stakiai kaj kun esperantistoj A.Žižienė , A.Gvildys el Jurbarkas. Sed la organizitan movadon de jurbarkanaj esperantistoj li ne aliĝis. Li partoprenis en kelkaj esperantistaj aranĝoj en Kaunas , Vilnius. En mezlernejo de Veliuona S.Liutvinavičius instruis Esperanton fakultative : en 1970-71 estis du grupoj kun 20 kaj 21 gelernantoj de X – XI klasoj, en 1971-72 estis du grupoj kun 23 kaj 20 gelernantoj,en 1995-96 estis du grupoj kun 12 kaj 13 gelernantoj el XI –XII klasoj. En muzeo de mezlernejo de Veliuona konstante funkciis ekspozicio de Esperanto literaturo. La plej spertaj en lernado de Esperanto estis B.Gaudinskaitė, I.Vyturytė, B.Višinskaitė, A.Jokubauskaitė, V.Dungveckis. Gelernantoj korespondis kun enlandaj kaj eksterlandaj gelernantoj. S.Liutvinavičius estis elektita al la Respublika Esperanto societo por interrilatoj de esperantistoj – gelernantoj. Liutvinavičius Stasys estas entombigita en tombejo de Veliuona. **L. Abromas**

**Redaktoro: Stanislovas Raulynaitis**
**Korektadon okazigis L.Abromas**
**Kontaktoj: klubas.horizontas@gmail.com**
**Tel. Nr. 8-620 21024**